Augustin Wibbelt,

Sola

tradukita de Manfred Retzlaff

Mortas post arbaro jen
Vesper-ruĝo nun,
Lante supreniĝas la
Granda, frida lun'

Blanka fluso de nebul'
Kuŝas ĉie ĉi,
Tra la ros-malseka gres'
Iras sola mi.

Paŝas mi tra l' mort-trankvil'
Kave sonas ĝi,
Glitas mia ombro nur
Kaŝe apud mi.

Traduko de la Basgermana poemo "Alleen" de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-578-1166 (2012-03-09 09:35:18)

Verkita de la poeto Vibelto, Aŭgusteno (Augustin Wibbelt, 1862 - 1947).
*Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, *04.11.1938) en 2011-11-22 laŭ la origina basgermanalingva teksto.*